

William Blake,
La Sekreto de Amo

tradukita de Clarence Bicknell

Ne esprimu vian amon;
Amo estas nedirebla;
La venteto dolĉe spiras
En silento nevidebla.

Mian amon mi esprimis;
Ĉion el la koro diris;
Ŝi, malvarma kaj tremanta,
Kun timego tuj foriris.

Baldaŭ post foriro ŝia,
Vojaĝanto tien venis;
Nevidebla kaj silenta,
Per ekĝem' li ŝin forprenis.

*Traduko de la Angla poemo "Love's secret" de WILLIAM BLAKE (*1757-11-28 - †1827-08-12) en Esperanton de Clarence Bicknell.*

Arg-1047-2124 (2014-06-08 19:12:24)

Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell.

William Blake,
Love's secret

Never seek to tell thy love,
Love that never told can be;
For the gentle wind doth move
Silently, invisibly.

I told my love, I told my love,
I told her all my heart,
Trembling, cold, in ghastly fears.
Ah! she did depart!

Soon after she was gone from me,
A traveller came by,
Silently, invisibly:
He took her with a sigh.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas WILLIAM BLAKE (*1757-11-28 - †1827-08-12).*

Arg-1047-2123 (2014-06-08 19:13:41)

Tiu ĉi poemo troviĝas en <http://www.online-literature.com/blake/621/>.